




Enhavo: Urboj Cheb kaj Plzeň.



Urbo Cheb (legu Ĥeb)

En junio 2021 ni pasigis unu semajnon en la ĉarma banurbo Františkovy Lázně en Okcidenta Bohemio. Dum la restado ni vizitis kastelojn, urbetojn kaj nacian parkon en la ĉirkaŭaĵo.

Proksimume 5 km de la urbo Františkovy Lázně, ĉer la limo kun Germanio, situas la urbo Cheb (ger. Eger). Tiu estas ankaŭ 40

km de la fama banloko Karlovy Vary, en la grava mezepoka reĝa vojo el Nurenbergo al Prago.

La urbo havas tre emocion historian. En la jaro 1146 apartenis la Cheb-regiono al la imperiestro Frederiko I. Barbarossa, kiu igis ĉi tie konstrui mezepokan kastelon. Januare 1285 edziĝis tie la bohemia reĝo Venceslao II. kun Juditha (Guta), la filino de la roma reĝo Rudolfo I. Poste la urbo



apartenis alterne al Bohemio aŭ Germanio. La 25-an de februaro 1634 estis en Cheb murdita Albrecht el Waldstein, la ĉefo de imperiestra armeo en la tridekjara milito kaj unu el la plej aŭtoritataj personoj en la tiama Eŭropo.

En la mezepoko estis la urbo Cheb ankaŭ centro de juda aŝkenaza kulturo. La plej grava sciencisto estis rabeno Nathan el Cheb, kiu pli poste foriris al Palestino kaj li estis sepultita en Jerusalemo. El Cheb devenas la t.n. la Ĥeba Biblio, unu el la plej malnovaj judaj manuskriptoj en Bohemio (13-a jarcento). Judoj estis el la urbo ripetfoje deportitaj, la ruiniĝo por la ĉi-tiea juda komunumo estis Sudeto-okupo kaj la dua mondmilito.

En la jaro 1930 registris sin al ĉeĥa nacieco nur 11 % de la loĝantoj kaj post la jaro 1945 la loĝantoj estis kun germana nacieco estis deportitaj en Germanion kaj la urbo senhomiĝis. Hodiaŭ loĝas en Cheb 32 mil loĝantoj.

Ni povas jam de granda distanco vidi la monumentan preĝejon Sankta Nikolao kaj Elizabeto. La lasta rekonstruo en la j. 2008 redonis al la preĝejo du 26 m altajn temploturojn, kiuj estis detruitaj en la j. 1945 dum bombardado. La templa navo estas 50 m longa kaj 30 m vasta. En la fenestroj estas multkoloraj vitrobildoj kaj sur la pilonoj raraj freskoj de la nurenberga majstro Lucaso. La plej malnova artefakto estas rara Roma baptofonto el la 13-a jarcento. En tombo oni trovis ĉerkon kun relikvioj de la nobelino Sidonio Ŝlik el la 17-a jarcento. La ĉerko estas nun eksponita en la templa navo kaj en la tombo estas ekspozicio pri la sepultad-temo. Kontraŭe de sur la turo ni vidas vastvaste la ĉirkaŭaĵon, sed ni devas unue supreniri 170 ŝtupojn.

La centro de la urbo estas eksterordinare bone konservita, inkluzive la placon kaj restojn de la barmuroj. La Ĥeba kastelo havas bonstate konservitan Nigran turon, kapelon kaj restojn de la imperiestra palaco. En la urboplaco troviĝas pitoreska bloko de

dek unu mezepokaj komercaj domoj, t.n. Ŝtipeto (Špalíček). Inter la domoj estas strateto, kiu estas vasta nur 160 cm.

En la urbo troviĝas ankaŭ aliaj memorindaĵoj, do mi povas rekomendi vian urboviziton 😊.

Stáňa Nováková

Urbo Plzeň (Pilzeno)

Survoje hejmen el la banloko Františkovy Lázně mi kun mia edzo vizitis la urbon Pilzeno. Iam ni tie travivis 7 belajn jarojn...



Pilzeno estas la dua plej granda urbo en Bohemio post la ĉefurbo Prago. Ĝi havas 175 mil loĝantojn. La urbo situas ĉe la kunfluo de 4 riveroj kaj estas famkonata pro la maŝinfabrika Ŝkoda kaj la bierfabrika

Prazdroj (bieroj Pilsner kaj Gambrinus).

Sur la historia urboplaco majestas la katedralo de Sankta Bartolomeo de la j. 1295 kun la plej alta preĝeja turo en Ĉeĥa respubliko (102,26 m). La belvidejo troviĝas en la alto de 62 m (kaj 301 ŝtupoj).

Ni vizitis Pilzenon ĝuste en la tempo, kiam la katedralo estis malfermita post trijara rekonstruado. La rekonstruado kostis pli

ol 100 milionojn da kronoj. Krom la muroj oni rekonstruis ankaŭ la pentraĵojn, la skulptaĵojn, la bildojn kaj altarojn, inkluzive de la „Pilsena Madono“, kiu estis manfarita de fame konata Petr Parléř antaŭ la j. 1384. La subteno de EU faris 95 % da kostoj.

Sur la ekstera katedrala muro troviĝas cizelita krado kun anĝeletoj, unu el ili estas sorĉfara – kiam vi tuŝos lin, li plenumos vian deziron. Oni diras, ke iafoje edziĝis en la katedralo ekzekutisto. Kaj ĉar li ne havis permeson iri internen, li havis anstataŭanton kaj li mem restis ekstere, kie li tuŝis la anĝeleton.

Ankaŭ ni tuŝis tiun anĝeleton kaj poste ni envenis en proksiman bierejon kun la restoracio por trinki bone malvarmigitan bieron „Pilsner“.

Stáňa Nováková

